

Kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu
de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj, 4-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 649, 1976.03.17 & 20

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En sia argumentado favore al la enkonduko de esperanto en la programojn lerneajn la esperantistaro ĝenerale asertas, ke la instruado de la zamenhofa lingvo faciligos tiun de la gepatra lingvo. Sed bedaŭrinde ili ne kapablas diri, kial kaj kiel tio estas ebla. Ilia aserto restas plej ofte speco de slogano.

A.- Dum prelegaro ni provos konkrete demonstri, kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj. Ni jam dediĉis du elsendojn al la peresperanta instruado de la franclingva vortaro kaj de ties ortografiado. Kaj la pasintan semajnon ni parolis pri la peresperanta instruado de la franclingva konjugacio. Interalie ni vidis, ke ĝi metas la gelernantojn en konkretan situacion, kiu kondukas al grava lingva malkovro : ke al unu esperanta propozicio kiel **vi manĝis** korespondas en la franca ses eblaj tradukoj : **tu as mangé, vous avez mangé, tu mangeais, vous mangiez, tu mangeas kaj vous mangeâtes**, kaj ke nur la kunteksto permesas elekti la taŭgan formon. La inverso ekzistas. Al la franca **on calcule** korespondas en esperanto **oni kalkulas** aŭ **ni kalkulas**.

Cl.- Fakte la konjugacia instruado permesas tuj fari stil-ekzercojn en realaj situacioj. Anstataŭ rutine konjugaciigi verbojn laŭ la lerneja kutimo, oni povas proponi kompletajn frazojn, kiuj devigas la junajn tradukistojn elekti la konvenan francigon. Ni reprenu nian propozicion **vi manĝis** kaj ni kompletigu ĝin, kaj ni ekzamenu la diversajn francigojn. Tiu ĉi laboro jam havas stil-karakteron.

A.- Dum **vi manĝis** la kukon, mi subite pensis al mia patrino. franciĝos per Pendant que **vous mangiez**, aŭ eĉ per Pendant que **vous étiez en train de manger**. Kontraŭe la frazo Mi kredas, ke **vi manĝis** la kukon. tradukiĝas per Je crois que **vous avez mangé**. La lernanto ankaŭ devos lerni distingi inter la du eblaj tradukoj de **vi**, elektante ĉu **tu**, ĉu **vous**.

Cl.- Tiuj traduk-ekzercoj permesas klarigi la francan punktadon. Oni povas ekzemple montri al la infanoj, kial en la franca frazo *Le dimanche, j'ai été chez ma mère*. oni metas komon post la vorto dimanche dum en la frazo *Le dimanche est un jour agréable*. oni ne metas komon post la vorto **dimanche**. Tiun ĉi klarigon oni povas fari helpe de la esperantigo de la koncernaj frazoj. Oni tiam rimarkas, ke en la unua frazo la vorto **dimanche** fariĝas **dimanĉon**, aŭ **je dimanĉo**, aŭ eĉ **dimanĉe** : Dimanĉon mi iris ĉe mian patrinon ; je dimanĉo mi iris ĉe mian patrinon ; dimanĉe mi iris ĉe mian patrinon. Estas facile dedukti la regulon, ke en la franca, kiam frazo ne komenciĝas per subjekto, komo metiĝas antaŭ ĝi, kaj vidi, ke tiu ĉi regulo ne valoras en esperanto, ĉar la markoj –n aŭ –e kaj prepozicioj indikas la nesubjektan funkcion. Kontraŭe, en la dua frazo la vorto **dimanche** estas la subjekto : Dimanĉo estas agrabla tago. Pro tio oni ne metas komon.

A.- Post tiu ĉi observado oni povas proponi traduk-ekzercojn, ĝis kiam la gelernantoj asimilis tiun ĉi nocion.

Cl.- Pli kaj pli la traduk-ekzercoj alportas lumon, kie neniu ajn gramatika klarigo tion faros. La infanoj intimiĝas kun iuj galicismoj. Ili ekzemple iom post iom distingos la diversajn signifojn de la verbo **aller** (iri), kaj konstatos, ke multaj el ili estas idiotismoj. **Il va**

esperantiĝas per **Li iras**, dum **Il s'en va** per **Li foriras**. **Il va bien** per **Li fartas** bone kaj **Il va partir** per **Li tuj foriros**.

A.- Tiu ĉi malkovro de la galicismoj komprenigas, kial iujn frazojn francajn oni ne povas gramatike klarigi. Jen tipa kaj frapa ekzemplo. En esperanto nur ŝanĝiĝas la loko de la adverbo **ne**, sed en la franca aldoniĝas por esprimi la samajn nuancojn aro da vortoj gramatike neklarigeblaj. Aŭdu :

Cl.- Marko **ne** manĝis la pomon.

A.- Marc n'a pas mangé la pomme.

Cl.- **Ne** Marko manĝis la pomon.

A.- Ce n'est pas Marc qui a mangé la pomme.

Cl.- Marko manĝis **ne** la pomon, sed la piron.

A.- Ce n'est pas la pomme que Marc a mangé, mais la poire.

Cl.- En esperanto ni havas 3 preskaŭ similajn kaj facile analizeblajn frazojn. Kaj ni rimarkas, ke nur kompara gramatiko povas alporti iom da lumo pri la franclingvaj respondaj frazoj. Nur la peresperanta instruado de la franca lingvo povas lumigi similajn stilajn demandojn.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni vidos, kiajn servojn esperanto povas alporti al la redakta instruado franclingva. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !